OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI


# Sennaciulo




Foto : "Alain Goric'h/Fédération APAJH"

Sennaciulo, oktobro 2007, n°10 (1228) ,MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

# Novaj eldonoj kaj projektoj de la Eldona fako kooperativa de SAT




## Ĵus aperis :

Kolora poŝtkarto pri Mortopuno.
Prezoj:
1......... 0.3€
10....... 2.5€
50....... 10€
100..... 15€

- Tri novaj glumarkoj
SAT-Flago, Paco (cxielarka), Paco (multlingva).







Prezoj: 1 eŭro por 10 sam-specaj glumarkoj, 7 eŭroj por 100.





**E-librejo**

Konforme al la kooperativaj celoj estas starigita reta librejo, kiu iĝos komplemento al la ekzistanta « SAT-Kulturo », disponigante libere dokumentojn en presopreta formo. Por kamaradoj dezirantaj havi ilin papere, ili ankaŭ estis etkvante presitaj en formato 14x21 cm, kun kolora kovrilpaĝo.


Jam estas haveblaj:


- For la neŭtralismon de Lanti (28p., 2,5 eŭroj);
- Parizo lumurbo de Djemil Kessous (30 p., 2,5 eŭroj);
- La abolo de la laboro de Bob Black









Karaj gelegantoj,

Jen la oktobra Sulo, denove ne tre akurate. Ni klopodas iom post iom rekapti la malfruon, kaj al tio efike helpas viaj pli kaj pli multaj kontribuoj. Estu pro ili dankataj, kaj daŭrigu tiudirekten.

Bonvolu atente legi la komunikon de PK kaj ĜK-aro fine de paĝo 139 kaj, se eble, provu (re)starigi SAT-rondon en via regiono. Tio estas tre grava, ĉar ju pli multaj estas la k-doj implikitaj en SAT-agado, des pli efike ni plenumos niajn celojn. Ankaŭ ne forgesu antaŭvidi en viaj feriplanoj, ke la SAT-kongreso okazos inter la 9a kaj la 16a de aŭgusto en Kazanlako (Bulgario).

Fine, jen la temoj por venontaj dosieroj:

- **en novembro**:
**"Politika situacio en Latina Ameriko"**;
kontribuojn sendu al
pablofoche@telefonica.net /

FOCHE PEREZ Pablo Antonio, Muñoz Garnica,
n˚29, 1Å, ES-23001 JAEN;

- **en decembro**:
**"Sano: perfortita homa rajto"**;
kontribuojn sendu al :
pimskrabo@yahoo.fr

MARKOVO Vito, 4 rue Beaubourg, FR-94100 Saint-Maur des Fossés.

Kamaradece,
La redaktoskipo

# Handikapigaj situacioj

## Enkonduke

En la sama jaro 1976, tiutempe ankoraŭ juna instruisto, mi frapis ĉe du pordoj. La unua estis tiu de SAT. La dua estis tiu de asocio ligita al instruista medio kiu zorgis pri la akcepto de handikapuloj (oni ankoraŭ ne diris personoj en handikapigaj situacioj) kiu dungis min aŭ pli precize akceptis min kiel ŝtatoficiston metita je la servo de la asocio. Tiu asocio (APAJH*), lige kun la francaj publikaj instancoj kaj ĉefe kun la publika lernejo, fariĝis unu el la grandaj federacioj kiuj nun fakas en la akompano de personoj en handikapigaj situacioj en Francio. Mi tre modeste partoprenis en tiu evoluo per la koncepto de administraciaj dosieroj por la kreado de novaj establejoj kaj servoj. Nun ĉe emeritiĝo, mi proponis aktivule ligi miajn du aktivecojn kaj tion faras jam de unu jaro

Oni proponis al mi, ke mi zorgu pri dosiero en la oktobra numero de Sennaciulo pri la temaro « handikapigaj situacioj ».

Lastaj mesaĝoj montras al mi ke venas demando : kio precize estas handikapitaj personoj kaj kio estas la rilato inter tiu koncepto "handikapigaj situacioj" kaj oficiale agnoskitaj handikapoj kiuj estas aŭ devus esti kompensitaj per helpo de la socio.

Respondoj al tiu demando povas esti iom diversaj, sed ekzistas nun internacia helpilo sub formo de priskribo de la kriploj aŭ mankoj kaj grado de handikapeco farita de Monda Organizo por la Sano.

Ni reparolos pri tio kaj pri la maniero laŭ kiu oni organizas la helpon al la handikapitaj personoj en diversaj landoj. Sed mi ne volis ke oni tiel komencu nian vojaĝon tra la mondo de personoj en handikapigaj situacioj. Mi preferis emfazi, pli homece, la ĉiutagan lukton de tiuj personoj por pli plena vivo, en etoso kiu ofte ne estas tiel malgaja ol oni povus pensi, ĉar tio estas la senparola leciono kiun ni, ne tro handikapitaj devas lerni de tiuj homoj kiun oni nomis en tre bela vorto uzata laŭdire en la UK de Florenco : alikapabluloj.

Gerardo LIEBLANG

lieblang.gerard@neuf.fr

*APAJH - france : **A**ssociation **P**our **A**dultes et **J**eunes **H**andicapés

Esperante : **A**socio **P**or **A**doltaj kaj **J**unaj **H**andikapitoj

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN :FR41 1000 0101 2342 2K02 064 - BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
**Plenum-Komitato de SAT** :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Krešimir Barković
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.

**Redakta Komitato** - Cyril Orsingher,Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, Hans Georg Kaiser. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Krešimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

❐

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

9 771163 044279